# HEJS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORINO:
F-INO CARMEN NAVARRO

**Nro. 75 - 1972**

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5




## GEEDZIĜO DE ESPERANTISTOJ

**Ŝi nia ĉarma redaktorino, li nia samideano Nazih Nader.**

**Senliman feliĉon!.**

EN TIU-ĈI BULTENO VI POVAS LEGI.......

Paĝo
Poezioj...............1-9-11
Malsamaj klasoj.AMO..2
Filatelia Sekcio......3
Turnu la omleton......4-5
La malgranda Dio......6-7
Naskiĝo de l'arto.....8
Edziĝo................10
Notoj.................12



HELAJ
OKULOJ,
SERENAJ.......

## ~Poezio~

Helaj okuloj, serenaj,

se de dolĉa rigardo vi estas laŭdataj

kial,se vi rigardas min, vi rigardas kolere ?

Se ju pli piaj,

des pli belaj vi ŝajnas al tiu kiu vin rigardas

ne rigardu min kolere,

ĉar vi ŝajnas malpli belaj.


Ve ! turmentoj rabiaj,

helaj okuloj, serenaj,

ja se tiel rigardas min, rigardu min almenaŭ.

(Gutierre de Cetina )

(¿1520? - 1560 )



P.P.A.

# MALSAMAJ KLASOJ DE AMO

ĈU AMO devas esti limigita al nombro de personoj kiuj ĉirkaŭas nin, aŭ en ĝi devas havi lokon tiuj kiuj suferas teruraĵojn, kruelaĵojn de iu aj maljusta batalo kaj tiuj kiuj pereas pro malsato dum aliaj naĝas en sateco ?.

ĈU AMO estas nur diri -"mi amas vin" - aŭ ĝi estas agoj kiuj kontribuas al la atingo de la feliĉo de ĉiuj homoj ?.

ĈU eblas amo kie ekzistas ĉiutaga batalkonkuro por la ekzistado ? .

ĈU AMO estas karitato aŭ la aŭtentika vera amo estas nuligi tiun komencon de maljusteco kiu estas karitato mem, rezignante la superfluaĵon ? .

ĈU AMO kiun ni sentas por la alia sekso devas esti limigita nur al ĝia fisika beleco aŭ, al la valoro de ĝiaj personaj ecoj ?.

ĈU AMO estas sinonimo esti neŭtrala por ĉio, alivorte, jesi ĉiam, aŭ, amo estas persona inklino al la saĝa dialogo kun tiuj kiuj ne kunsentas kun vi ?.

ION POR FARI : Oni demandu al la homoj kial ili ne trovis sian personan sukceson en laboro.

ION POR AMI : Ne nur ni amu niajn gepatrojn, gefilojn kaj geamikojn, sed ni amu ĉiujn kaj speciale per nia komprenemo, tiujn, kiuj jam perdis la esperon.


ION POR ESPERI : Mi enlitiĝas ĉiutage en tiu espe ke la homaj rajtoj estu realaĵo kaj ne nur vortoj.

JOSE



## FILATELIA SEKCIO

### POŜTSTAMPOJ PRI ESPERANTO




En la kampo de la filatelaĵoj,la grupo poŝtstampoj estas tre grava, ĉar dum la jaroj kelkaj centoj da ili oni uzis por festi kaj memorigi kongresojn, ekspoziciojn. k.t.p. .

Dum la jaro 1971 oni uzis tra la mondo 20 poŝtstampojn pri Esperanto-eventoj, inter ili tiu de Alicante, okaze de nia Nacia Kongreso.

La unua speciala poŝtstampo estas tiu uzita en Krakow- tiama Aŭstrujo-. en la jaro 1912,okaze de la oka Universala Kongreso de Esperanto. Okaze de la venonta U.K. en Portland -Usono- ankaŭ oni uzos porokaza poŝtstampo kaj ankaŭ la L.K.K. petis al la koncernaj aŭtoritatoj memorigan poŝtmarkon.

Polujo estas la lando kiu havas pli da E-poŝtstampoj, ĉar jam preskaŭ atingis la ciferon 100. Hispanio havas entute 13. La unuan oni uzis en Valencia, okaze de STA-Kongreso en 1934. La duan Manresa, en 1.936, okaze de kataluna E- Kongreso. La trian en Zaragoza, en 1.954, okaze de la 15ª Nacia Kongreso de Esperanto. Ankaŭ en Zaragoza kaj en 1.956, pro la 26ª Kongreso de IKUE. En 1.961 , en Barcelona, okaze de la 13ª IFEF Kongreso. En la venontaj jaroj kaj en la indikitaj urboj, okaze de la koncernaj Naciaj Kongresoj de Esperanto : Valencia, Palencia, Bilbao, Zaragoza, La Laguna, Mieres kaj Alicante. En 1.968 en Madrid, okaze de la 53ª U.K.





JAUME MOLERA

Sta. Joaquina, 13

MOYA-(Barcelona)

## " TURNU LA OMLETON "

Antaŭ granda kaĝo en kiu troviĝas vivanta estaĵo konversaciadis du birdoj. Por distingi unu birdon de la alia, ni nomu ilin, birdo nº 1, kaj birdo nº 2. Jen pri kio ili paroladis :

Birdo Nº 2: Jes, mi komprenas ke vi estas feliĉa kun tiu besto kaj ke eĉ vi ĝin amas, sed diru al mi, ĉu ne estas tro da prizorgoj por vi? . Ja okupiĝo pri manĝaĵoj, purigado, ĝi estas tro da laboro por vi.

Birdo Nº 1: Ne, mi pensas ke ne, tiu besto, kiel vi ĝin nomas estas ege inteligenta kaj amema, ĉiam kiam ĝi vidas min ĝi moviĝas kaj min salutas ; ofte ĝi havas bonan humoron kaj eĉ kantas; tiam la plezuro estas tiel granda ke tio bone rekompencas mian penadon.

Birdo Nº 2: Ĉu ĝi estas danĝera?, ĉar mi konstatas ke ĝi estas granda kaj forta.


Birdo Nº 1: Ofte mi devas atenti, sed regule ĝi estas tre karesema kaj mi ludas kun ĝi. Mi bone alkutimigis ĝin al ĉi tiu vivo.

Birdo Nº 2: Mi suferas kiam mi vidas ĝin mallibera en tiu kaĝo dum ĝiaj samspecanoj kuras libere tra la kamparo en komuneca vivo.

Birdo Nº 1: Mi ne samopinias, al ĝi en ĉi tiu kaĝo mankas nenio, ĝi bone manĝas, ĝi vivas sendanĝere, ĝi ne devas okupi sin pri manĝagoj kaj loĝejo, kaj krome ĝi estas amata de mi. Male, okazas tre ofte, kiam ĝi vivas inter siaj samspecanoj, ili ofte interbatalas kaj regule la vivo inter ili estas ne vivinda ĉar unuj superregas la aliajn. Pri libero, ĝi jam alkutimiĝis al ĉi tiu vivo, eble, iufoje ĝi sopiras siajn kamaradojn , sed tiuj momentoj rapide forpasas kaj ĝi denove estas feliĉa. Se mi malfermus la kaĝon eble ĝi ne forkurus, kaj se jes, ĝi baldaŭ estus revenanta ĉar eĉ ĝi trovus la vivekziston ege malfacila.

Birdo Nº 2: Malgraŭ ĉiuj viaj asertoj, mi opinias ke ĝi naskiĝis por vivi libera kiel ĉiu estaĵo de la terglobo.







Ĉar vi enkaĝigis ĝin, kiam ĝi estis malgranda, certe ĝi ne konas alian vivformon, sed mi estas certa ke neniu el ĝiaj samspecanoj ŝanĝus al ĝi sian vivon. Ili jam preferas vivi libere, eble kun malsato, malvarmo kaj en konstanta kverelo, sed mi ripetas, libere. En tiu kaĝo, ĉu ĝi povas ĝui la amon, la rilatojn kun tiuj kiuj estas de la sama speco ?.

Birdo Nº 1: Pri tio vi jam pravas, mi intencas serĉi por ĝi kamaradinon, sed kompreneble la afero ne estas facila. Ankaŭ mi deziras havi idojn de ĝi naskiĝintaj ĉi tie. Mi nur deziras ke ĝi estu feliĉa. Eble estas malprudente diri ĉi-tion sed mi amas ĝin kvazaŭ ĝi estus familiano.

Birdo Nº 2: Mi kompatas tiun inteligentan beston kaj mi ne envias ĝian sorton, vivi ĉiam mallibera. Diru al mi, kamarado, ĉu vi ŝanĝus vian vivon por la via ?, tiel ke vi estus la enkaĝigita kaj ĝi via mastro ?.

Birdo Nº 1: Kara amiko, ĉi tio estas la vivo, ni estas la "bestoj" plej inteligentaj, permesu ke mi diru bestojn, de la tero kaj kiel vi mem diris, la mastroj. Pli-malpli ĉiuj aliaj specoj kiuj troviĝas en la terglobo devas submetiĝi al niaj deziroj.

LUIS SERRANO PEREZ

..................

A T E N T U ! .- POR KE NIA REVUO " HEJS" ESTU VERA JUNA NACIA REVUO, NI ATENDAS DE VI ĈIUJ KUNLABORON PERE DE ARTIKOLOJ RAPORTAĴOJ KTP.

NI ESPERAS ILIN !



# L A
# M A L G R A N D A
# D I O

(Komparaĵo)

Rakontas la fabelo, ke unu fojon, volante ia muelisto hardigi sian malgrandan filon je la hejmaj aferoj, ŝarĝis al sia azeno du grandaj sakojn da faruno, kaj komisiis al li ke tiel al portus ilin al certa kliento. Se li havus ian ajn malfacilaĵon, li mem vokus la necesecon kaj ĝi lin helpus.

Eliris, do, la knabo, kontenta kaj fidema je la patra parolo, sed en la mezo de la vojo, paf! la azeno, por sternaĉi sin, sin ĵetis sur teren, kaj la du sakojn disiris, forĵetitaj kaj malligitaj. La knabo estis malgranda kaj ne povis levi la sakojn. Sed memorante la patrajn parolojn, vokis forte la necesecon:-Neceseco, Neceseco!. Sed la "neceseco" ne alvenis.

Tiam, ĉar alvenis jam la nokto kaj li nek povis iri hejmen, forlasante tie la sakojn kaj la azenon nek kuraĝis resti tie sola, vidante sin tiel forlasata, varpis sekvantan artifikon: ruliĝi la sakojn en altaĵon kaj poste, pasigante la azenon, malsupre, dukontraflanke, ŝarĝi ilin. Tiel faris, kaj, feliĉe, ŝarĝis ilin, kaj poste alportis al la kliento. Kiam, revenante hejmen, rakontis la knabo al sia patro la peripetion kaj diris, ke li faris ĉion sola, ĉar la neceseco, kvankam li forte ĝin vokis, ne alvenis, la patro, tre fiera pro sia malgranda filo kaj aperante al li la okulojn, replikis:-Sed kiu vi kredas, ke helpis vin fari ĉion se ne la neceseco ?.

\- - - - - - - - - - - - -

Pensante tiun ĉi belan fabelon, mi pensas, ke tio ĉi mem kio okazis al la muela knabo, okazis al la Homaro rilate al Religio.

Ankaŭ la Homaro estadis ĉiam meze de danĝeroj kaj necesaĵoj (tertremoj, inundaĵoj, vulkanoj, agresaĵoj de la sovaĝbestoj kaj de aliaj malamikaj homaj triboj

ktp). Kaj ĉiam ankaŭ estadis siaflanke kiuj ĝin sugestis, ke li vokus spiritojn kaj deojn, ĉar ili ĝin aŭdis kaj helpadis. Kaj ĝi, la Homaro, ilin kredadis, kaj vokadis ĉiujn la deojn kaj la spiritojn en ĉiuj siaj necesaĵoj. Ĉiam kaj ĉie, ĝis nia moderna tempo.

Sed ĉar ankaŭ ĉi tie -kiel al la knabo- ne alvenis al ĝi Dio ajn aŭ spirito por helpi ĝin, faris ĝi sola ĉion kion al ili petadis. Ĝi sola faris ĉion kion la homo havas. Nun, la Dio estas precipe Dio por la homoj, ĉar ili kredas ĝin providentema rilate al la homoj.

Sed se, fare, la providenteco estis historie faritaĵo de la homoj, la homo estas vere "Dio". Ne la kreinto de la mondo, sed certe tiu kiu faris kaj faras ĉion tion ni uzas kaj utiligas en la vivo. Ĝi, do, la homo, la Homaro, estas LA MALGRANDA DIO.

Tiu ĉi penso estas tre optimista, tre klara kaj tre klariga, kaj faras ni estu dankemaj rilate al la aliaj homoj, al la socio, al la Homaro. Sed precipe nin movas meti ankaŭ nian malgrandan sableron en la grandegan entreprenon, komunan.

Kaj la esperantistoj havas specialan aferon pri tio ĉi. Nia "malgranda dio" faris, certe, ĉion kion ni antaŭ diris. Sed ĝi ne scias paroli. Estas laŭ tartarulo: <u>ne kompreniĝas</u>. Kaj ni, la esperantistoj, havas la mision helpi ĝin, donante al ĝi la parolon, la el ĉiuj kompreneblan parolon, per la tutmonda lingvo ESPERANTO.

Tia ĉi estas nia misio kaj ni gloro.

- - - - - - - - - - -

MARTINO ARANGUREN

Bº Gaztelu, 3, 4º dcha.

<u>SAN SEBASTIAN</u>



# NASKIĜON DE L'ARTO

La malluma problemo pri la origino de l'arto estas multnombra,ne solvebla. Tiu temo prezentigas al ni problemon vere sensacian:ni alfrontas la naskiĝon de l'arto, tio estas kun kreaĵo nur homa,sed kiam ĉi tiu projektas for si mem kun kapableco sufiĉa por percepti la ĉirkaŭan mondon, kiu reellaborata en lia menso estas figurata en arta imago.


Post tiu momento la historio de nia civilizo ekkomencas.Sed, kiel naskiĝis l'arto?.Kiaj estas la motivoj de tiu naskiĝo?.Kial komencis l'arton?. Ne estas facile koni la komencojn, la impulsojn, kiuj fariĝis naski la homa arto, sed se ni pripensas atente ni trovos konklude du kialojn kiel fundamentaj en la naskiĝo de l'arto: La ideo pri figuro , ideo kiu intencas kopii, imiti, repreni,la agojn de la ĉiutaga vivo, aŭ plej simple religio, kaj la esprima ideo, kiu montras tion intima, tion persona.

La problemo eble estas aŭ religia, aŭ magia. Eble ekzistis io simila al partoprena magio kaj la homo troviĝas mergita en la naturo, kaj tiu viveco aldonita al la partopreno en la naturaj fenomenoj. Ankaŭ povas esti religia afero. La homo povas per sia volo estigi tiujn fenomenojn de ia klaso, kiujn li deziras asimili kaj proprigi. La estiga magio estas fakto nedudebla, kaj kiel fakto havas esprimon kiun ni povus nomi arta, kaj tio konsistas en la posedo de la bildo implicas posedi realecon. Kaj posedante la bildon estigas la realecon enkorpiĝinta en si mem.

Sed la homo ne celis faris pro l'arto mem, ne, li deziris esprimi ion, sed ne pro arto, nur pro granda interna forto kiu impulsas lin esprimi ion, aŭ por ĝin reprezenti kvankam ne estus lia deziro. Ne povas krediĝi ke la praĥistoria homo faris arton pro l'arto, sed nur por reprezenti ion kara al li , ion de li dezirata.

Tial, de la kunligo de ties ideoj, eble naskiĝis l'arto.

AZCUENAGA-(Santander)



## AL LA D-RO. ESPERANTO



Ni estis sen lumo.
Malamikoj ni estis.
Ni batalis furioze.

Ĝis kiam klera homo.
Radion de suno kunportis.

Sian tutan vivon
al ni, li oferis.

Je nia unuiĝo
li fervore konfidis.

Eĉ en sia lasta sopiro
li la homaron memoris.
Ni, estu indaj de lia espero.

MARIA

---

DEZIRAS KORESPONDI ........

Vidvo 52-jara, amanta la literaturon, naturon kaj E-movadon, deziras korespondi kun skribema hispanino. Lia adreso:

S-ro. ARNE BENGTSSON
ÅBYBERGSGATAN 32
431 - 31 MÖLNDAL
SVEDLANDO

25--an. de MARTO



# T A G O  D E  F E L I Ĉ O

Nia ĉefredaktorino Mª Carmen Navarro kaj Nazih S. Nader, ankaŭ esperantisto kaj kunlaboranto en nia revuo, geedziĝis la 25-an. de Marto.

Ĉi-tiun okazintaĵon oni ne povas deflankigi, ĉar geedziĝo inter esperantistoj ne estas ĉiutaga afero , pro tio mi kredas ke oni devas fari raporton pri tiel neforgesebla tago.

La ceremonio komenciĝis je la 12ª tagmeze en tiu bela preĝejo kiun la Karmelitanoj havas en Bilbao.

Kiel kutime, la fianĉo estis atendanta ĉe la sojlo de la preĝejo la alvenon de la fianĉino kiu ne multe prokrastis sian aperon, ŝin akompanis la geedziĝa protektanto.

Kun la akordoj de la nupta marŝo, la edziĝontoj eniris la preĝejon akompanataj de ambaŭ geedziĝa protektantoj kaj la sekvantaro.

La vestaĵo de la fianĉino, iomete ekzotika, laŭ orienta stilo, reliefigis ŝian belecon, ĝi estis farita el damaska brokaĵo. La fianĉo vestis klasike . La ceremonio estis brila kaj emocia, ĉar la gefianĉoj partoprenis ĝin laŭ la nova liturgio.

Poste la "ĵusbakitaj geedzoj" ricevis la gratulojn de la ĉeestantaro, oni faris la kutimajn fotografaĵojn kaj finfine alvenis la bona momento iri en restoracion kie la invititoj lunĉis. La novaj geedzoj vojaĝis poste al Palma de Mallorca kie ili pasigos sian mielan lunon.

De tiuj-ĉi paĝoj ni deziras al tiu feliĉa paro, je la nomo de ĉiuj, longdaŭran vivon kaj neelĉerpeblan feliĉon.

MIAU






## ĈU HOMARA SENTO ?

Genas vento,
ploras ĉiel',
malgaja vetero
vagadas inter ni
kiel fantomo.
Kaj mi demandas min
pri kia sento
moviĝas ĝi,
vagante pene sur tero.
Ĉu estas homara sento
tiu malkvieta vento ? .
Ĉu ploro estas la pluvo,
kaj dolĉa ridet' la sûno ?
Vere ĝin mi ne scias,
sed eble ĝi estas tial.

ADURIZ- (Santander)



# K O N G R E S O J !!

XXXIIª KONGRESO DE HISPANA ESPERANTO FEDERACIO
ĝi okazos je la 20-an. ĝis 25-an. Julio 1.972 en la
alloga urbo de V I G O.
Informas pri la Kongreso:
Sekretariejo de la L.K.K.
Str. Velàzquez Moreno, 20, 2º
V I G O
kaj la Sekretariejo de H.E.F.

---

FRANCA-HISPANA ESPERANTISTA RENKONTIĜO
Organizita de niaj francaj gesamideanoj la ĉijara franca-hispana esperantista renkontiĝo, okazos en PAU (Francujo) la 13-an kaj 14-an de Majo 1.972.

Informas:

| En Francujo | En Hispanujo |
|---|---|
| S-ro.Jacques Decobert | H.T.E.S. ĉe Inés Gastón |
| 64- ACCOUS | Pº ;arina Moreno, 35 |
| | Z A R A G O Z A |

---

57ª UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
Okazonta en Portland (Oregon) de la 29ª-7 ĝis la 5ª -8 1972 sub la Alta Protektado de Governor Tom McCall Estro de la ŝtato Oregon.
Unua bulteno kun aliĝilo estas senpage ricevebla ĉe la konstanta adreso de la Kongreso, ĉe la peranto S-ro. Ramón Molera, Ĉefdelegito de UEA en Hispanujo, str. Sta.Joaquina, 13 - MOYA-(Barcelona)

---

28ª IJK de TEJO, 16. - 22.7.72 - TORUN / POLLANDO
Ĉeftemo estos "Junularo kaj la Tria Mondo" .
Oni aliĝu al: S-ro. HANS BAKKER / Amsterdam - Z, Kastelenstraat 231, NEDERLANDO.

---

La GREKA esperantista Junularo invitas vin al la S E M E D' 72. Seminario Mediteranea Pri Lingvaj Kaj Ebla Kunlaborado.
Loko: R E T H I M N O N -- K R I T I
Dato: 30/7 - 5/8/1972
Aliĝkotizo: 33 U.S. dolaroj aŭ 990 draĥmoj.
Limdato: 15/7/1972
Antaŭpago: 10 U.S. dolaroj aŭ 300 draĥmoj.
Informas: JUNULARA SEKCIO DE HELENA ESPERANTO ASOCIO
Agiu Meletiu 54 - ATENO (814) - GREKLANDO